
# *Kubo kaj Nauro plifortigas siajn rilatojn por evoluo*

Image not found or type unknown



Havano, jun 1 (RHK) Kubo kaj la Respubliko de Nauro subskribis  en ?i tiu ?efurbo, kvin memorandojn de kompreno, kiuj plifortigos komunajn areojn por la disvolvi?o de amba? nacioj.

Post la akcepto en ?i tiu ?efurbo de David Ranibok Adeang, prezidento de la Respubliko de Nauro, fare de Miguel Díaz-Canel Bermúdez, unua Sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj Prezidento de la Respubliko, amba? gvidantoj faris oficialajn interparolojn kaj partoprenis en la subskribo de interkonsentoj kiuj profitos al la sano, la bioteknologio, la sporto kaj la lukto kontra? la klimata ?an?o, inter aliaj aspektoj.

Pri diplomatio, Bruno Rodríguez Parrilla, membro de la Politika Buroo kaj Ministro pri Eksteraj Aferoj, kaj Charmaine Scotty, estro de Sano, Medicinaj Servoj kaj Virinaj Aferoj de Nauro, subskribis interkonsenton pri la reciproka sendevigo de la vizopostulo por posedantoj de diplomatiaj kaj oficialaj pasportoj.

La subskribo de tiu ?i instrumento faciligos kunlaboron en la politika, ekonomia kaj socia ordo de amba? teritorioj.

Aliaj institucioj, kiuj montris sian volon kunlabori, estis la Ministerioj pri Publika Sano kaj Scienco, Teknologio kaj Medio, same kiel la Nacia Instituto pri Sporto, Fizika Edukado kaj Distro de Kubo kaj, flanke de Nauruo, la Departemento pri Sano kaj Medicinaj Servoj, tiu de Media Administrado kaj Agrikulturo, kaj tiu dedi?ita al Sporto, pri Kunlaboro por la Evoluo de Fizika Eduko kaj Sporto.

Dum sia oficiala vizito al la antila nacio, kiu fini?as hodia?, prezidento Adeang deponis florkronon al José Martí, Nacia Heroo de Kubo, kaj vizitis la Memorialon kiu portas la nomon de la Apostolo en Havano.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/356236-kubo-kaj-nauro-plifortigas-siajn-rilatojn-por-evoluo

**Radio Habana Cuba**